Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**07-a de aŭgusto 2020, numero 10**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Legantoj de la revuo *Esperanto*




Foto de Jinsu SO


Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, la redaktoroj de la revuo *Esperanto*, dum la lastaj jaroj multe vojaĝas kaj renkontiĝas kun la legantoj kaj interesiĝantoj pri la oficiala organo de UEA.

Ĉi-foje, la 6-an de aŭgusto, ili prezentis ĝin kaj la Retan Revuon (https://revuoesperanto.org/) virtuale.

Se vi estas la partoprenanto de la Virtuala Kongreso, vi povas (re)spekti la renkontiĝon en la sistemo de https://vk.retevent.com.

Ankaŭ ni invitas vin spekti la videaĵon, kiun preparis Anna Striganova post la 1-a Virtuala Malferma Tago de UEA, ĉe la jutubkanalo *UEAviva*: https://mallonge.net/5e.

## Legantoj de la revuo *Kontakto*



Rogener Pavinski

Rogener Pavinski estas la redaktoro de la revuo *Kontakto*. La 7-an de aŭgusto, kadre de la Virtuala Kongreso, li renkontiĝis kun la legantoj. Tiu ĉi revuo estas tre populara kaj konata en la Esperanto-mondo, ĝi traktas nemovadajn temojn.




La partoprenantoj de la Virtuala Kongreso povas (re)spekti ĝin: https://mallonge.net/5g

Krome, ni volas memorigi, ke ĉe la jutuba kanalo *UEAviva* aperas serio da babiladoj kun Rogener *En Kontakto*: https://www.youtube.com/user/UEAviva

## La 106-a UK en Facebook

La paĝo pri la 106-a UK en Belfasto, 2021! Daŭre aperos novaj informoj pri la kongreso.




https://www.facebook.com/106.Universala.Kongreso.en.Belfasto



# Giuliano Turone intervjuita de Humphrey Tonkin pri Homaj Rajtoj kaj Unuiĝintaj Nacioj: preparitaj komentoj

## Virtuala Kongreso de Esperanto, 2 aŭgusto 2020

En via profesia vivo (kaj eble ankaŭ en via esperantista vivo), vi ofte devis fronti la demandon de homaj rajtoj. Kion tiu ideo de homaj rajtoj signifas al vi, kaj kie kaj kiel vi aplikis ĝin?

En mia profesia vivo, kaj kiel juĝisto kaj kiel prokuroro, mi ofte devis trakti eĉ tre gravajn malobservojn de homaj rajtoj. Tiuj, kiuj praktikas la juĝan profesion, konstante renkontas, survoje, grandajn kaj malgrandajn malobservojn de homaj rajtoj, kiuj konsistigas krimojn kaj tial devas esti procesitaj kiel tiaj. La plej intensa sperto en la kampo de malobservoj de homaj rajtoj estis tiu, kiun mi spertis en la du jaroj, en kiuj mi laboris kiel prokuroro ĉe la Haga Tribunalo por iama Jugoslavio. Vere terura sperto. Oni ankaŭ devas diri, ke tiu, kiu praktikas ian povon, tial ankaŭ juĝistoj kaj prokuroroj, devas zorgi ĉiutage pri la plenumo de la reguloj kaj devas praktiki la profesion ekskluzive en la servo de justeco kaj de la koncerna nacio, por ne fali en eblajn malobservojn mem de homaj rajtoj.



La dokumento al kiu ni esperantistoj konstante reiras estas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, de 1948. Kial tiu dokumento gravas? Kiujn limojn ĝi havas?

La graveco de ĉi tiu dokumento estas enorma kaj evidenta por ĉiuj. La Deklaracio estas la respondo de la homaro al la morala kadukiĝo, al la teruraj ekstermoj kaj atrocitoj, kiujn postlasis la nazis-faŝismaj reĝimoj kaj la plej ruiniga mondmilito de ĉiuj tempoj. La limoj estas, ke la homaj rajtoj daŭre estis kaj estas perfortitaj en diversaj mondopartoj (foje eĉ en landoj kun progresinta demokratio) dum ĉiuj 72 jaroj de 1948 ĝis hodiaŭ. Estus granda hipokriteco ne rekoni ĝin.

La Universala Deklaracio limigas sin al individuaj rajtoj. Kio pri kolektivaj rajtoj? Ĉu tiaj rajtoj havas bazon? Kion fari kiam kolektivaj rajtoj kolizias kun individuaj rajtoj?

Mi dirus, ke inter la fundamentaj rajtoj de la homa persono ankaŭ estas same fundamentaj kolektivaj rajtoj. Ekzemple, unu el la plej malbonaj malobservoj de homaj rajtoj estas genocido. Kaj mi dirus, ke la tragika disvastiĝo de femicido estas ankaŭ endemia malobservo de kolektiva homa rajto: rajto de virinoj ne nur al seksa egaleco, sed ankaŭ al respekto kaj protektado ĉefe de ilia fizika integreco.

Evidente la koncepto de homaj rajtoj estas ne nur jura, sed ankaŭ politika. Fakte, ofte tiuj du konceptoj, la jura kaj la politika, konfliktas inter si. Kion fari pri tio, ke la demando de homaj rajtoj estas ofte uzata selekte, ekzemple de unu registaro kontraŭ alia, aŭ de unu politika partio kontraŭ alia? Kaj ĉu simila selektemo ekzistas ĉe la publika opinio?

Mi respondus ĉi tiun demandon en sufiĉe drasta maniero. Fronte al homaj rajtoj la politikaj rondoj dividas en du kategoriojn. Ekzistas la politiko serioze kaj sincere interesata je defendo de la homaj rajtoj (ekzemple, jes al savado de la boato-homoj, kiuj tuj dronos kaj almenaŭ parte rajtas azilon), kaj ekzistas la politiko, kiu absolute ne volas scii aŭ nur ŝajnigas zorgi pri ĝi. La samo okazas en publika opinio.

Kiuj internaciaj mekanismoj ekzistas por efike apliki kaj aplikigi la homajn rajtojn? Kiun rolon ludas Unuiĝintaj Nacioj?

Unuiĝintaj Nacioj ofte estas blokitaj de vetorajtoj. La internaciaj mekanismoj estas ĝuste UN, Eŭropa Unio kaj aliaj similaj internaciaj instancoj. Sed ene de

ili estas neniu homogeneco. Mi vere ne vidas efikajn mekanismojn.

Kiel gravaj estas tiuj mekanismoj de UN? Kion ni povas fari por ilin fortigi?

Mi ripetas. Ili estas gravaj mekanismoj, ĉar se ili ne ekzistus, la afero estus eĉ pli malbona. Sed ne ekzistas unueca celo kaj ne ŝajnas al mi, ke ekzistas komuna volo fortigi ilin.

En Unuiĝintaj Nacioj, homaj rajtoj konsistigas unu el la tri "kolonoj" de tiu organizo (la aliaj estas Paco kaj Evoluigo). Kion UN (kaj la internacia komunumo ĝenerale, inkluzive de organizoj kiel UEA) faru en la venontaj 25 jaroj por plibonigi kaj plifortigi sian agadon tiukampe?

La estonteco de la tri "kolonoj" dependos de la politika volo de la membrolandoj de la Unuiĝintaj Nacioj, precipe de la ĉefaj potencoj. Do mi ne scias kion respondi.

Kion ni kiel individuoj povas fari por fortigi la koncepton kaj aplikon de bazaj homaj rajtoj? Kiel ni agu loke, nacie, internacie?


Ni nur povas agi kiel eble plej efike por disvastigi konscion kaj sentivecon pri ĉi tiu afero.

## Tago de la amerikaj landoj, kunlabore kun la amerikaj komisionoj de UEA kaj TEJO

La Tago de Ameriko estas la lasta el la regionaj tagoj de la Monda Festivalo de Esperanto. Sekvante la promenon de la suno sur la planedo, la Festivalo havis kiel unuan regionan tagon la Tagon de Azio kaj Oceanio (TAO) la 26-an de junio. Postvenis la Mezorienta kaj Nordafrika Tago (MONAT) la 4-an de julio. La 22-a de aŭgusto kaj la 23-a de aŭgusto estas respektive la tagoj de Eŭropo kaj Afriko. Kaj la 29-a de aŭgusto estos la Tago de Ameriko.

La evento estos festado de kulturo kaj solidareco kaj okazos virtuale per Zoom interrete. La prezidanto de la organizteamo estas Rafael Despradel. Se vi havas proponojn pri programeroj, vi bonvenas kontakti. Necesos aliĝi.

Sekvu la informoj pri tiu ĉi kaj la aliaj Esperanto-eventoj, okazantaj kadre de la MondaFest' en la Eventa Servo: https://eventaservo.org/e/mondafest2020






## Speciala oferto

Manko de ĉeesta Universala Kongreso ĉi-jare ne signifu mankon de intereso pri la plej impona Esperanta aranĝo. Dum la tuta aŭgusto aĉetu kun triona rabato sendepende de kvanto la plej riĉan informilon pri la UK: Sed homoj kun homoj: https://katalogo.uea.org/?inf=7360


# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope



Edukado.net+Ekparolu!




Aŭtora Momento kun Nicola Ruggiero



Scio Sen Bariloj



Internacia Kongresa Universitato: La ora nombro (François Lo Jacomo, Francio)



UN 75-jara: Eksterrilata agado de UEA kaj la Festivala Temo UN 75-jara



Akademio de Esperanto respondas



Faka Forumo: Renkontiĝo de Fakaj Asocioj kaj Faka Agado en Esperanto



Libroj de la Jaro: Eldonejo Mondial